

## La Estraro MAPis “la vojon” en Roterdamo

*Raporto de Mark Fettes, Prezidanto*

La tradicia ĉeesta kunsido de la Estraro okazis de la 20a ĝis la 22a de aprilo 2018 en Roterdamo. Partoprenis kvin estraranoj (Fettes, MacGill, Kadar, Spanò kaj Cid), al kiuj aldoniĝis sesa estrarano, HUANG Yinbao (Trezoro), elektita tuj antaŭ la kunsido per reta voĉdono de la Komitato. La sepa estrarano, LEE Jungkee, ne venis fizike, sed partoprenis en parto de la kunsido per Skajpo. Krome ĉeestis la Ĝenerala Direktoro, Martin Schäffer; la observantoj de TEJO (Charlotte Scherping) kaj ILEI (Mireille Grosjean); kaj dum granda parto de la kunsido ankaŭ Ana Ribeiro, la gvidanto de la projektoteamo por renovigi la retejon kaj datumbazojn de UEA. Dum la unua posttagmezo partoprenis la Konstanta Kongresa Sekretario, Clay Magalhães, por trakti temojn rilate al la Universalaj Kongresoj.

La kunsido disvolviĝis harmonie kaj konstrue. Multo ŝanĝiĝis en la lasta jaro: UEA havas novan Ĝeneralan Direktoron kaj novan Ĝeneralan Sekretarion, dum TEJO havas tute novan Estraron. Pretiĝis la unuaj paŝoj en teknika modernigo, kiu malfermas la vojon al novaj retaj servoj kaj rimedoj por niaj membroj. Samtempe, la delonga struktura deficiito en la buĝeto de UEA atingis novan altojn. La kunsido do havis ampleksan kaj defian tagordon. Por resumi niajn ĉefajn konkludojn, la Zamenhofa poemo “La vojo” montriĝis surprize trafa! Sed juĝu mem...

Financoj: tra densa mallumo...

Kiel atendite, la evoluo de la financoj en 2017 estis malbona. La kostoj (elspezoj) de la Asocio estis signife malpli ol buĝetite, ĉefe dank’ al ŝparoj ĉe la Oficejo (€29.000) kaj ĉe Movada Evoluigo (€22.000) – la suma ŝparo estis pli ol €50.000. Tamen daŭris negativaj evoluoj ĉe la rimeda (enspeza) flanko. Kotizoj alportis €50.000 malpli ol buĝetite, kongreskotizoj €19.000 malpli, kaj rento pro diversaj investoj €40.000 malpli ol buĝetite. Krome la plano enspezi pli per ekstermovadaj subvencioj – unu el la ĉefaj iniciatoj de la antaŭa Ĝenerala Direktoro – estis sukcesa nur en rilato al la Volontula Domo, lasante truon de €90.000 ĉe la Rimedoj. El tiuj diversaj evoluoj (aŭ ne-evoluoj) rezultis deficiito en 2017 de ĉ. €160.000.

La Estraro do dediĉis ĉ. unu tagon de la kunsido al analizado de la buĝeto por 2019, kune kun diversaj diskutoj pri la plej bonaj strategiaj direktoj por UEA nuntempe (vidu poste). Realisme, ni devas antaŭvidi ke la rimeda flanko de la buĝeto ne multe pliboniĝos ene de unu jaro. La kongreso en 2019 (Lahtio) kredeble estos malpli granda ol en Lisbono; la enspezoj pro rento povus esti ankoraŭ pli malaltaj; kaj ni ne plu inkluzivos subvenciojn en la buĝeto de la Spezokonto, krom en la formo de lupagoj ĉe la Volontula Domo. Aldone, la Estraro jam decidis malaltigi la kompenson al la Spezokonto el la Rezervo Dumvivaj Membroj, kiu jam estas multe sub la bezonata nivelo por pagi la kostojn de tiuj membroj dum ilia atendebla vivodaŭro. Tial eĉ en plej bona kazo la buĝetaj rimedoj verŝajne restos sub la nivelo de 2017.

...briletas la celo...

Unu klare necesa paŝo estas plialtigi la kotizojn. La laborgrupo pri financa resanigo jam diskutis kaj aprobis proponon de la Ĝenerala Direktoro, altiĝi la bazan kotizon je 10% por 2019. La laborgrupo tamen favoras pli ĝeneralan reformon de la kotiz-sistemo, pli-malpli laŭ la ideoj jam prilaboritaj de la Komitato, plej laste per Komitata Forumo en Seulo. La Estraro konsentis pretigi tian proponon kunlige kun la buĝeto 2019. Laŭ ĝi, malaperos la kategorio MG (Membro kun Gvidlibro); la kategorio MJ (Membro kun Jarlibro) fariĝos la baza kotiz-kategorio, kun nur retaj servoj; la kategorio MA restos pli-malpli senŝanĝa. La kotizo por baza membreco en Nederlando (la referenca kotizo), laŭ la ĝisnuna analizo, estos €44; la MA-kotizo €74. Tio signifas relative grandan plialtigon de la MJ-kotizo; kompanse, oni proponos rabatojn por TEJO-anoj (50% sub la aĝo 19, 25% inter 19 kaj 24) kaj donos la eblon de rabato ankaŭ al aliaj homoj kun limigitaj monrimedoj. Pliaj detaloj venos kun la formala propono al la Komitato.

Alia financa reformo celas la traktadon de la rimedoj por Movada Evoluigo. En la lastaj jaroj la Estraro celis iom post iom kreskigi tiun rubrikon en la buĝeto, i.a. kun la ideo, ke la membroj vidu ke parto de la kotizoj uziĝas por konkretaj agadoj preter la servoj, administrado, ktp. Tamen la rilato inter tiu rubriko kaj la diversaj fondaĵoj de UEA, kiuj same financas tiujn agadojn, ne estas tre travidebla. La Estraro do nun proponos reformon laŭ kiu difinita procentaĵo de la jaraj kotizoj (ekskluzive de la Dumvivaj Membroj) irus por nutri la fondaĵojn laŭ restrukturita fondaĵa buĝeto. Sekve la rubriko Movada Evoluigo transformiĝus al unu simpla (minusa) buĝeta linio sub Kotizoj, kaj la buĝeto por la fondaĵoj fariĝus la ĉefa rimedo por plani la agadon laŭ la kvar strategiaj agadkampoj. Ni opinias, ke tiu reformo multe helpos por komunikado kun la membroj, kaj ankaŭ por pliklarigo de la buĝetaj diskutoj en la Komitato.

...al kiu kuraĝe ni iras

Kunlige kun la lanĉo de la nova reta membrospaco de UEA, la Estraro proponos al la Komitato ĉeson de la papera eldono de la Jarlibro. Tiu eldono kostas al la Asocio ĉ. €16.000 jare, dum la nova membrospaco disponigos la samajn informojn al niaj membroj en konstante aktuala kaj pli oportuna formo. Evidente tiu reformo estos ebla nur en la kadro de la proponata reformo de la membro sistemo. La nuna financa situacio de la Asocio tamen postulas fari tian kuraĝan paŝon. Ni iom diskutis la ideon eldoni Almanakon pri la movado ĉiuj trian jaron, kiun ni financus kiel ĉiuj aliaj eldonaĵoj de UEA (t.e. ekster la Spezokonto); tio tamen ankoraŭ ne atingis la nivelon de konkreta propono al la Komitato.

Ŝparema aliro al la aliaj buĝetaj rubrikoj sukcesis malpliigi la kostojn je pliaj 5%, tiel ke ni atingis malnetan buĝetan proponon, kiu antaŭvidas deficiton en 2019 de ĉ. €130.000. Pli grandaj ŝparoj postulus pli drastajn ŝanĝojn en la Centra Oficejo, ekz. per la maldungo de oficistoj aŭ la translokigo de la Oficejo al malpli kosta lando. La Estraro konsideris tiujn alternativojn, sed ankoraŭ ne konvinkiĝis, ke ili prezentas la plej bonan evoluojon. La tujaj prioritatoj – reformi la membro sistemon, modernigi la administradon, kaj renovigi la retejon – postulas stabilecon en la oficejo kaj bonan kunlaboron inter estraranoj kaj oficistoj. Ili samtempe kreas bazon por energia varbado de novaj membroj – kerna ero de la nova Strategia Plano, kies ĉefaj trajtoj konturiĝis dum la kunsido.

Strategio: simile al stelo en nokta ĉielo...

La nuna Strategia Laborplano estis akceptita de la Komitato en 2013. Ĝi enhavas ampleksan analizon pri la diversaj strukturoj kaj agadkampoj de UEA, kaj kelkaj el ĝiaj ĉefaj emfazoj – reta renovigo, aktivula trejnado, evoluigo de la informa kaj instruista agado – daŭre gvidas la prioritatojn de la Estraro.

Tamen, la Strategia Laborplano malsukcesis pri sia ĉefa celo, nome mobilizi aktivulojn je diversaj niveloj por komuna agado cele al la plifortigo de UEA kiel tuto. Sur ĉiuj agadkampoj, tiu manko sentiĝas – interalie ĉe la individua membraro, kies malrapida sed konstanta malkresko montras, ke niaj malnovaj membroj ne sufiĉe sukcesas varbi novajn.

Diskutante pri la agadkampoj Konsciigo, Kapabligo, Komunumo kaj Kunordigo, la Estraro venis al la komuna konstato, ke UEA devas multe pli malfermi sin al novaj ideoj kaj novaj fortoj. Nun ekzistas tro granda divido inter la “ofichavantoj” (estraranoj, komitatanoj kaj aliaj) kaj la ordinaraj membroj, kaj malmultas la enirvojoj por senti sin pli aktive ligita al la agado de la Asocio. Sendepende de la celoj de la agado, la estonteco de UEA dependas de nia kapablo (re)fariĝi aktivula organizo, kiu ĉiu membro sentas sin bonvena, subtenata, kaj invitata al engaĝiĝo.

...al ni la direkton ĝi diras

La diskutoj kondukis al identigo de tri ĉefaj strategiaj prioritatoj, resume: Membraro, Aktivularo, Projektaro. Oni do povus nomi tion MAPo de la vojo! Kolektiĝis multaj konkretaj ideoj pri laborplano responde al tiuj prioritatoj, kiu venos poste al la Komitato por diskuto. Ĉi tie ni nur resumis la ĉefajn direktojn.

*Membraro: Flegi la individuan membraron kaj varbi novajn membrojn.* Tiucele formiĝis nova estrara subteamo (Kadar, MacGill, Cid), kiu havas la taskon evoluigi novajn metodojn por varbi kaj flegi membrojn, inkluzive tiujn de TEJO-aĝo. Nian aliron influas i.a. la konsiloj de Humphrey Tonkin, eksa UEA-prezidanto kaj nova estrara komisiito pri mecenatoj kaj filantropio. Nepras nutri la senton de la membroj pri aparteno al UEA; nepras teni ilin pli bone informitaj pri la agado de UEA kaj la disvolviĝo de Esperanto tutmonde. Ni devas ankaŭ pensi pri la atendoj de la reta generacio, zorgante ke UEA prezentu sin kiel organizo de la nuntempo. Kun la disvolviĝo de tiu strategio kreiĝos novaj kunlaborebloj por delegitoj kaj ĉefdelegitoj, por landaj asocioj kaj lokaj grupoj.

*Aktivularo: Krei kaj disvolvi vojojn al aktiva partopreno.* Tiurilate TEJO jam montris irindan vojon, investante multajn rimedojn en la varbado, trejnado kaj gvidado de aktivuloj; pli proksima kunlaboro sur tiu kampo estas celinda. La furoran sukceson de la AMO-seminarioj devas akompani pli sistemeca ellaboro de retaj kursoj, konsilaroj, kaj aliaj materialoj por aktivuloj. Kreiĝu listoj de "mikrotaskoj" por homoj kun diversaj niveloj de scio kaj sperto. Oportunaj retaj rimedoj, kiel la UEA-forumo, uziĝu por informi, inspiri kaj kunordigi aktivulojn diverskampe. Apud la formalaj "komisionoj" kresku malpli formalaj "laborgrupoj" sub UEA-aŭspicio.

*Projektaro: Kunlaborigi kaj kapabligi homojn per konkretaj projektoj.* Kiel montras la pasinta Strategia Laborplano, la strukturo de UEA estas tre kompleksa kaj ĝiaj celoj tre vastaj. Kun siaj limigitaj rimedoj, la Asocio pli bone antaŭeniros, se ĝi fokusiĝos al konkretaj projektoj kiuj alportas videblajn, inspirajn rezultojn. Tiaj agadoj estas ankaŭ la plej taŭgaj por ricevi ekstermovadan subtenon kaj rekonon. Tio signifas certagrade ŝanĝi la Asocian kulturon kaj ĝian aliron al planado kaj buĝetado, eksteraj kaj internaj rilatoj, kaj la taskigo de volontuloj kaj gvidantoj. La proponitaj ŝanĝoj en la buĝetado de Movada Evoluigo, menciitaj ĉi-supre, estas frua paŝo en tiu evoluo.

La sekvaj paŝoj: Nur rekte, kuraĝe, kaj neflankiĝante...

Ĉi tiu resumo de la roterdama kunsido ne kaptas ĉiujn detalojn, nek ĉiujn decidojn. Troviĝis tempo ankaŭ por konkretaj diskutoj pri la kongresa programo en Lisbono, por akcepti novan regularon por la regionaj kongresoj, por aprobi novan dividon de administraj respondecoj en la Centra Oficejo, kaj por trakti specifajn problemojn de la movado en diversaj landoj kaj mondopartoj. Tiujn temojn prezentos aliaj mesaĝoj, laŭbezono.

Se en ĉi tiu raporto ni fokusiĝis al financoj kaj strategio, tio havas konkretajn kialojn. Ĝuste en la interplektiĝo de tiuj du kampoj troviĝas la ŝlosilo al la estonteco de UEA. Strategio, kiu ne sukcesas plibonigi la financojn de la Asocio, aŭ financaj decidoj, kiujn ne subtenas strategia vizio, estas egale nedaŭripovaj. Necesas pensi pri ambaŭ kune. La Estrara kunsido alportis kelkajn fruktojn tiurilate. En la venontaj semajnoj, ĉiuj komitatanoj havos la eblon konatiĝi kun la detalaj proponoj, kiuj kreskis el niaj diskutoj, kaj partopreni en la kunpensado kaj kunplanado por redirekti la Asocion sur vojon al rekresko.